

PREZO: 1:50 Kr.

# MALGRANDA REVUO

Nro 3 • 1951

9a JARO

## ENHAVO:

	Pago
Armena kulturo kaj sveda esploro, de S. Lorelli	1
Fantazioj, de J. Kohen-Cedek	6
Vivo flustras . . . , de L. C. Deij	11
Pensoj pri tradukado de poezio, de M. C. Butler	12
Kio estas feliĉo?, de Einar Hult	16
Debato	19
Lingvaj sugestoj	23
Literaturo	26

*Redaktoro — Eldonanto:*

STELLAN ENGHOLM, HAGGE, SVEDUJO

# MALGRANDA REVUO

aperas provizore kvaronjare. Prezo 1,50 kr. (inkl. sendkoston).  
Jarabono 6 kr. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 5 rpk. —  
S. Engholm, Box 205, Hagge, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 268023.

MR ne aperigas anoncojn aŭ informojn.

Nemenditaj manuskriptoj estas resendataj nur se akompanas  
ilin afranko por resendo.

## Perantoj

- Aŭstrio: Eldonejo "Tramondo" Neutorgasse 9, Wien I.  
Belgujo: Flandra Esperanto-Instituto, Blankenberge Steenweg  
72, Brugge.  
Brazilo: Sro Jozefo Joels, Caixa Postal 2 — Lapa, Rio de  
Janeiro.  
Britujo: Libroservo de UEA, Heronsgate, Rickmansworth  
(Herts).  
Ĉeĥoslovakio: Esperanto-Asocio en ĈSR, Uralské Nám. 9,  
Praha.  
Danujo: Libroservo de CDEL, Hörmarksalle 5, Risskov.  
Studenta Esperanta Klubo, Nitivej 7, Kopenhago F.  
Finnlando: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki Kå.  
Francujo: Unuiĝo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol,  
Paris X.  
Germanujo: Dr. Siegfried Ziegler Verlag, Engelbertstrasse 7,  
(13 b) München-Pasing.  
Hispanujo: Sro Amado Pons, Sicilia 217, 1—2, Barcelona.  
Israel: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalem.  
Italujo: Sro Leo Costantini, Piazza Lagosta 2, Milano.  
Nederlando: Sro L. C. Deij, Putsebocht 181, Rotterdam Z.  
Polujo: R. Sakowicz, Parafialna 3, Nova Sol.  
Portugalujo: Sro A. P. da Silva, Rua 48 nro 7—3 Alvalade,  
Lisboa.  
Svisujo: Sro O. Walder, Eigenheim, Romanshorn.  
Usono: Sro Arthur S. Kane, 1121 N. Central Ave., Glendale 2,  
California.

# MALGRANDA REVUO

Nro 3

9a JARO

1951

## Armena kulturo kaj sveda esploro

De S. Lorelli

Sro Sourène Erzinkian-Lorelli estas armena  
instruitulo loĝanta en Uppsala, kie li en rilato  
kun la universitata biblioteko kontaktas la ar-  
menologojn en la mondo kaj laboras por la  
armena literaturo kaj la armena lingvo, eble  
la plej antikva kaj studinda hindeŭropa lingvo.  
P. Nn.

La svedaj esploristoj estas la unuaj en Eŭropo, kiuj el  
sciencia vidpunkto interesis sin pri la lingvo kaj historio de  
Armenujo. Tio okazis en epoko, kiun stampis du geniuloj:  
Karlo XII kaj Petro I. Svedujo sendis en 1697 al Persujo iun  
Grandé Ambassade kun unu el siaj plej eminentaj  
diplomatoj, Fabricius, kiel ĉefo. Ankaŭ juna viro nomata  
Henrik Brennerius, naskita en Kronoby en Österbotten 1669  
kaj kiu jam 1691 akiris la gradon de magistro en filozofio en  
la universitato de Uppsala, estis alaŝeita al tiu grava politika  
delegacio en la malproksima lando en Meza Azio.

La ŝaho Abbas la granda (1557—1628) el siaj konkeraj  
militiroj en Kaŭkazio estis kondukinta kun si en Persujon  
milojn da armenaj metiistoj kune kun iliaj familioj, kiuj laŭ  
lia iniciato fondis malgrandan armenan socion proksime al  
la ĉefurbo de la lando, Ispahan, por stimuli kaj evoluigi la  
persajn arton kaj metiojn. Kiel konstantan memorigon pri ilia  
dezertigita hejmlando — ili estis trenitaj for el siaj hejmoj  
en la regiono de Djoulfa apud Araxes — la ŝaho donis al tiu  
armena kolonieto en Persujo la nomon Nova Djoulfa. Jam  
post kelkaj jardekoj la armena foirvilaĝo disvolvigis je granda  
centro de arto kaj artmetioj. Baldaŭ ĝi ligis viglajn inter-

naciajn komercrilatojn kun Bombay, Calcutta, Madras kaj aliaj urboj en Hindujo kaj same kun Amsterdam, Venecio, Ĝenovo, Marseille ktp.

La juna kaj inteligenta filozofia magistro el Uppsala ligis amikrilatojn kun pluraj el la plej eminentaj armenaj familioj en Nova Djoulfa, precipe kun la armenaj pastroj, kiuj konsistigis la kernon de la klera tavolo en la kolonio. Oni povas menci, ke la grava loketo estis farita sidejo por la armena ĉefepiskopo en Persujo kaj Hindujo. Kun sia intereso pri Oriento, profitiga tiel al la sveda ambasado kiel al liaj propraj sciencaj studoj, Henrik Brennerius estis ofta vizitanto ĉe siaj amikoj en Nova Djoulfa; La armenoj volonte donis al li la historiajn, literaturajn, ekonomiajn kaj politikajn informojn, kiujn li deziris, ne nur pri Persujo sed ankaŭ pri ĉiuj landoj en Meza Azio kaj en Hindujo. Tiamaniere la juna sveda akademiano tute nature komencis dediĉi sin al la studo de la armena lingvo kaj la historio de Armenujo. La rezulto de tiuj studoj estis traduko en latinon — la internacia lingvo de la scienco en tiu tempo — de "Historio de Armenujo" de Movsès Khorénatsy, la plej granda armena historiisto el la fino de la 5a jarcento. Oni povas aldoni, ke la 5a jarcento estas konsiderata kiel *V o s k é D a r*, t. e. la ora jarcento, de la armena literaturo. Tiu traduko de Henrik Brennerius vekis atenton en la universitata mondo de Eŭropo kaj malfermis la okulojn por la neceso de pli proksima studado de la lingvo kaj historio de la armena popolo.

Oni prave povas aserti, ke neniu sciencisto, en Svedujo aŭ iu alia lando de Eŭropo, kiu dediĉas sin al kompara lingvoscienco aŭ hindeŭropaj lingvoj, apenaŭ povas ignori la armenan lingvon. Cetere pluraj svedaj eruditoj estas alte taksataj de la armenaj sciencistoj: profesoro Evald Lidén ĉe la universitato en Gotenburgo pro siaj studoj "Armeniaca" kaj "Armenische Studien", profesoro Herbert Petersson en la universitato de Lund pro sia verko "Arische und armenische Studien", por menci nur du el ili.

Ankaŭ hodiaŭ ni havas en Svedujo scienculojn, kiuj kulturas la tradicirican svedan amon al la armena lingvo kaj la armena

historio. La profesoro de sanskrita lingvo kaj lingvokomparo en la universitato de Gotenburgo, Hjalmar Frisk, eldonis en 1944 monografion pri la armena lingvo, "Etyma Armeniaca", kaj profesoro H. S. Nyberg ĉe la universitato de Uppsala, de 1926 redaktoro de la konata revuo "Le Monde Oriental", en sia "Hilfsbuch des Pehlevi" esploris multajn armenajn vortojn. La sama rimarkinda kulturpersono en Journal Asiatique (1929 kaj 1931) same kiel en sia verko "Die Religionen des alten Iran" (Leipzig 1938) parolis pri armenaj fontoj, precipe pri la granda armena verkisto Eznik el la 5a jarcento. Profesoro Gunnar Gunnarsson en sia memparolado pri profesoro Tore Torbiörnsson, ankaŭ li kun armenaj intereso, same substrekis la gravecon de la armena lingvo en la studado de hindeŭropaj lingvoj.

\*

De 1882 ĝis 1903 loĝis en Stokholmo instruitulo nomata Norayr Byzandatsy, tre sperta pri la armena lingvo kaj kulturo. Devene li estis armeno, naskita en Konstantinopolo, sed, kiel li mem neniam forgesis akcenti, regato sub Lia Majesto Oscar II, ne sub la turka sultano. Ĉar Norayr profunde abomenis la sovaĝan Turkujon, kie milionoj el liaj samlandanoj estis masakritaj. Dum siaj dudek jaroj en Stokholmo li aperigis en la armenaj taggazetoj kaj revuoj studojn pri la kulturo kaj historio de sia lando. En 1884, same el Stokholmo, li en Konstantinopolo eldonigis ampleksan kaj rimarkindan franc-armenan vortaron kaj en Tiflis novan reviziitan eldonon de Korune, verkisto el la 5a jarcento, kun detala studo pri lia tempo kaj liaj verkoj. En 1887 fondis Norayr la unuan — kaj lastan — armenan revuon eldonitan en Svedujo, Knnasser (Kritiko). Sed malfeliĉe por ni armenoj ne ekzistas en Svedujo iu armena presejo, t. e. kiu ajn sveda presejo, kiu disponas armenajn literojn por kompostado de armena teksto. Sed nia armena instruitulo kopiadis mem propramane ĉiujn 64 paĝojn de sia revuo Knnasser, kaj poste li transdonis la litografian aranĝon al la litografia laborejo de C. A. Carlsson en Stokholmo. Mi ne scias, ĉu tiu litografejo ankoraŭ ekzistas. Tiamaniere aperis en 1887 du numeroj de la armena revuo.

En 1892 la itala scienca akademio petis Norayr ellabori raporton pri la armenologia studfronto. El Stokholmo Norayr tiam transsendis sian rimarkindan raporton "Pri la bezono de novaj armenaj tekstlibroj". Tiu, kiu petis pri la raporto, estis lia amiko profesoro Emilio Teza, eminenta specialisto pri Armenujo kaj membro de la scienca akademio en Romo. En sia traktaĵo Norayr i. a. akre kritikis la katolikajn armenajn monaĥojn en la melitaristaj monaĥejoj en Venecio kaj Vieno, kiujn li konsideris same nesciantaj kiel nekapablaj por literatura kaj scienca laboro laŭ nuntempaj severaj postuloj. Oni povas aldoni, ke de pli ol sesdek jaroj tiuj du armenaj monaĥejoj el literatura kaj scienca vidpunkto perdis ĉiun signifon por la armenoj.

Norayr mortis dum la unua mondmilito en decembro 1915 en Italujo, kie li pasigis la lastajn dek jarojn de sia vivo. Sed la regato de Oscar II volis esti enterigata en sia adoptita hejmlando, en Svedujo, en Norda Tombejo de Stokholmo. Al Italujo li kunportis siajn manuskriptojn kaj sian rimarkindan armenologian bibliotekon — librojn en la armena kaj aliaj lingvoj — kiujn li konservis malgraŭ tio, ke italaj sciencaj institucioj en 1909—1910 proponis al li 40.000 frankojn por ili. En sia testamento Norayr donacis kaj la manuskriptojn kaj la bibliotekon al la Asocio de Fredrika Bremer, kiu per interhelpo de profesoro Evald Lidén cedis ilin por 2.000 kronoj al la universitato de Gotenburgo.

Memkompreneble la manuskriptoj de Norayr estus havinta grandan sciencan intereson por la armenoj mem. Sed dum la unua mondmilito 1914—1918 kun la granda nacia tragedio de la armenoj, kiam en terura masakro 11—24 aprilo 1915 pereis pli ol la duono de 2,5 milionoj da loĝantoj en turka Armenujo kaj la alia duono samtempe estis forpelata el sia riĉa hejmlando, tiam neniu pensis pri la manuskriptoj de Norayr aŭ entute pri iuj ajn manuskriptoj. Pli ol 1,5 miliono da armenoj pereis dum tiuj tagoj, miloj da intelektuloj estis mortigataj, centmiloj da infanoj kaj virinoj estis ekstermataj en la plej nehoma maniero — kiom signifis tiam por ni iuj manuskriptoj, eĉ se devenantaj de armeno kiom ajn eminenta, kiom ajn erudita?

Ĉiuj naciaj fortoj koncentriĝis en tiu tempo por savi la centmilojn da orfaj infanoj el malsato kaj mizero. Oni konsideris la manuskriptojn de Norayr perditaj, tiom pli ĉar li ne postlasis heredanton.

Kiam mi 1946 en la universitata biblioteko de Uppsala faris miajn historiajn-literaturajn studojn, la ĉefbibliotekisto dro Anders Grape atentigis min pri la armenaj manuskriptoj de Norayr Byzandatsy, kiujn posedas la biblioteko de la Gotenbarga universitato; li eĉ proponis al mi, ke oni mendu ilin el Gotenburgo por ekzamenado. Estas facile imagi, kian ĝojon vekis tiu novaĵo en intelekta armeno kum amo al la literaturo kaj historio de sia lando. Post studado kaj ekzamenado 1946 kaj 1947 de la manuskriptoj, kiuj iam apartenis al "la solemlulo en Stokholmo", kiel oni kelkfoje nomis Norayr, mi informis la armenan gazetaron pri la trovaĵo kaj donis liston pri tiuj armenaj literaturaj verkoj, kiujn oni de tridekdu jaroj konsideris perditaj. Kaj mi ne forgesis rakonti al miaj samlandanoj, al kiu mi dankis tiun trovon. Oni permesu al mi ankaŭ en la sveda gazetaro esprimi la dankemon, kiun ni armenoj sentas al ĉefbibliotekisto dro Grape, al kiu ni dankas la trovon de la manuskriptoj de nia granda samlandano.

Deko da ĵurnaloj kaj armenaj revuoj — i. a. en Parizo, Nov-Jorko, Boston, Kairo, Beirut, Konstantinopolo, Teheran, Elchmiadzin-Erivan — dediĉis artikolojn al la demando pri la manuskriptoj de Norayr en Svedujo. Oni diris, ke la manuskriptoj de nia granda sciencisto, kiuj dum 35 jaroj restis nekonataj kaj neaperintaj, devas esti al la dispono de la armena scienca akademio kaj la universitato en Erivan, kaj same por sciencistoj loĝantaj eksterlande. Oni demandis sin, kiel oni plej bone faru tion, kaj venis al la respondo: arĥivfotografi la manuskriptojn kaj deponi la reproduktaĵojn en la armena nacia biblioteko en Erivan kaj en Bibliothèque Arménienne Noubarian en Parizo, kiu lastenomita kultura institucio estas fondita de heredantoj de Nubar paŝao, unu el la plej signifaj ŝtatestoj de la moderna Egiptujo.

Laŭ tiu komuna deziro de armena flanko mi ĝis nun fotografis dek manuskriptojn, entute dumil paĝojn, kiujn la

universitata biblioteko de Uppsala sendis al la scienca akademio en Erivan. Inter la dek fotografitaj manuskriptoj troviĝas 110-paĝa studo pri traduko en la armenan de Faustus de Byzance, greka verkisto el la fino de la 4a jarcento; la armena traduko estas la sola nun ekzistanta teksto de lia verko, kaj ĝia granda signifo do estas senklarige komprenebla. Krome la manuskriptoj entenas studon 235-paĝan pri Eznik, la jam menciita verkisto el la 5a jarcento, kaj 518-paĝan pri Grigor Magistros el la 11a jarcento.

Tiuj manuskriptoj, kiujn mi en julio 1950 arĥivfotografis en la universitata biblioteko de Uppsala estas tamen nur malgranda parto de la tuta kolekto. Mi konsideras necese fotografi proksimume 16.000—17.000 paĝojn por ebligi al la armena nacia biblioteko en Erivan kaj Bibliothèque Arménienne Nubarian en Parizo disponigi al armenaj esploristoj la plej gravan parton el la neaperigitaj manuskriptoj postlasitaj de la regnaro de Lia Majesto Oscar II, la armena erudito Norayr Byzandatsy.

Laŭ artikolo en Svenska Dagbladet, Stockholm 23. 1. 1951, tradukis kun la permeso de la aŭtoro kaj la nomita gazeto

*Paul Nylén.*

## Fantazioj

*De J. Kohen-Cedek*

La vorto fantazio signifas la kreaĵon imagopovon de la homa menso. Fantazio estas nia pensa forflugo en la malproksimon de mondo nercala, en mondon de niaj revoj, en la fabelan landon de niaj iluzioj. Ĝi estas esprimplena kaj enhavoriĉa vortideo.

La vorto devenas ne el eŭropaj lingvaj fontoj. Ĝia origino estas araba. Arablingve ĝi estas elparolata "fantazije" — kun kutime akcentita antaŭlasta silabo. Sed ĝi prezentas iomete alian idekomplekson ol la menciitan. Ĝi signifas ĉion nekutiman kaj eksterordinaran. Eĉ pli: ĉion ekstravagancon, kon-

traŭnan al la laŭnorme saĝa kaj deca konduto. Vulgardialekte la vorto signifas simple ĉian petolan amuzadon.

Tedoplena kaj enuiga estas la rutinkutima vivo de la mezorientaj urboj, tutegele ĉu grandaj ĉu provincaj. "La dormanta Oriento" estas epiteto ofta aplikata al tiu mondparto. La vintra sezono forpasas tie tre rapide. La somera suno arde brulas. Pro la varmeĝo la homoj estas ĉiam laĉaj, malviglaj kaj treege maldiligentaj. La stratotoj estas mallarĝaj, senlumaj, malpuraj, kun akre malagrablaj odoroj kaj miriadoj da muŝoj svarmantaj en la akro. En la malpuraj bazaroj, apud la vendejoj, sidas la grasaj varvendistoj oscedante sur malaltaj benketoj kaj fumas siajn senfinajn "nargilojn" (akvopipo). La virinoj en densaj nigrotulaj vizaĝkovriloj, nepre akompanataj de garde sekvanta boparenco, ne povas plivigligi la stratvivon. Kaj la komerca marĉando abunde ornamita per akrevoĉaj, rafinitaj, seksotemaj insultvortoj kiel afero ordinara jam ne olvokas incitiĝon.

Kiam la enuo pro la indiferentoplena atmosfero atingas la kulminpunkton, serĉas la ribelema homa spirito iajn ĉirkanaĵojn. Subite aŭdiĝas krio, la bazaro tuj vigliĝas kaj tumultiĝas. Homoj rapide kolektiĝas. Sur ĉies vizaĝo aperas mieno de gaja scivolemo. Ĉiuj ekstitite mangestas. Kio okazis? — Fantazije! — Iu enŝovis sian ponardon inter fremdajn ripojn.

De tempo al tempo la sopiroj al "fantazioj" (en la orienta senco) ricevas pli vastan esprimon. Antaŭ nelonge en la provinco Ard-el-Vadian (Neĝed-Iraka limo) iu beduena tribo militatakis kelkajn vilaĝojn. Multaj viroj estis mortigitaj aŭ vundataj, virinoj perfortigitaj kaj forkondukataj. Tiaj okazaĵoj estas agnoskitaj de la orientaj moroj de la plej praaj tempoj: la nomada, dezerta mondo ĉiam batalis kontraŭ la mondo koloniiga, kamparana. Tiuj du sociordoj apartenas al reciproke antagonismaj polusoj, neniam kaj neniel akordigeblaj.

Okazas "fantazioj" pli sekvodanĝeraj, kiam, ni diru, la kurdoj buĉas la asirianojn aŭ kiam la irakaj araboj atakas la kurdojn aŭ kiam la druzoj kverelas kun la sirianoj. Similkarakteraj "fantazioj" estis la invado de Palestino de ĉiuj kunigitaj armefortoj de la tuta Araba Ligo. Ĝia neatendita kolapso kaj posta

panikforkura fiasko siatempe treege surprizis la londonajn iniciatintojn kaj inspirintojn de tiu malsukcesa teatroprezentado. La araba simplulo nomas la fantaziojn de tiu speco "bolitika", elparolante ho anstataŭ la neprononcebla po. Verdire li ne ŝatas "bolitikon": ĝi ofte estas tro multekosta. Li preferas fantaziojn pli sendanĝerajn kaj multe pli amuzajn. Li ŝatas aŭdi pri la famaj amaventuroj ĉirkaŭ la trono de Kairo, kun ĉiuj eblaj aŭ penseblaj detaloj. "Sinema balaŝ!" (senpaga kinejo!) — li ravite diras. Ravas lin ankaŭ la oftaj interesaj kriminalromanoj, kiujn prezentas la palacaj "revolucioj" en Damasko.

Antaŭ du jaroj estis malkaŝata la komploto de la jerusalema eksmuftio\* ĥaĝ\*\* Amin el-Huŝejni, ekzilito vivanta en Egiptujo, kontraŭ la vivo de la reĝo Abd'-Allah de Transjordanio. Antaŭ nelonge en la rezidejo de Harun el-Raŝid okazis "fantazio" en stilo de "Mil kaj unu noktoj": la polcestro de Bagdad preparis planon de dinastiforigo, kun konvena "sangellaso", sed iu el la komplotanoj perfidis. En Damasko dum naŭ monatoj okazis ses sinsokvaj perfortaj ŝanĝoj de regnestroj. Oni diras, ke la sepa jam okazis sed fiaskis, kaj la detaloj ne estas konigataj, ĉar la regnestro deziras nebuligi la tutan aferon. La oficialaj informfontoj neas la rakonton. "Ĝi estas" ili deklaras, "nuraj gazetfabeloj". Povas esti. Tamen mi ĝuste scias kio baldaŭ aŭ post nelonge povos okazi en tiu traputrinta medio, senprincipa kaj sen homaj, naciaj, sociaj kaj politikaj idealoj, speciale en ĝiaj komplikitaj cirkonstancoj kaj precipe en ĝia nuna morale malsana stato.

Venos iu ambicia kolonelo aŭ paŝao kun areto da ofenditaj oficiroj kaj nekontentaj oficistoj, arestos la ĉefministron (aŭ la diktatoron), ekzilos la landprezidanton, uzurpos mem la regdirektilon, juĝos la antaŭulojn kaj kondamnos 2—3 el ili al pendigo, 4—5 al eterna mallibero kaj amnestios kelkajn el ili. La kolonelo (aŭ la paŝao) memkompreneble tuj kunvenigos la eksterlandajn ĵurnalistojn kaj deklaras, ke li verdire "savis la demokration" en la patrujo kaj ke li intencas enkon-

\* Alta religia rango ĉe la islamanoj.

\*\* Antaŭnome metata titolo de islamaj religiaj aŭtoritatuloj.

duki kelkajn progresigajn reformojn, unuavice la agraran kaj la klerigan. Li eĉ jurasertos, ke li persone ne strebas al akiro de la regopotenco. Por pruvi tion li invitos en la novkreatan "koalician" ministraron eĉ kelkajn politikulojn de la antaŭa kabineto, ĝuste el tiuj sinjoroj, kiuj jam servis ĉiajn imagoblaajn mastrojn kaj ricevis ŝmirsalajron el ĉiuj koruptfontoj de la Meza Oriento (kaj kiuj tial posedas reputacion de estimindaj kompetentuloj).

Poste certe sekvos novaj "parlamentelektoj". Tio signifas, ke la "partioj", kiuj posedas dekon da samgrupanoj, publike deklaras, ke ĉar la elektoleĝoj evidente estas maldemokratiaj kaj ĉar la despota uzurpinto de la diktatoraj prerogativoj per elektomanipuloj garantiis al la siaj la plejmulton, tial ili, la defendantoj de la popolrajtoj, decidis bojkoti la maljustajn kaj falsajn elektojn. Kontraŭe, la partioj posedantaj po cento da membroj decidis partopreni la elektojn. Ĉar nur tiel ili ricevos sur la konto de elektelspezoj dolarojn, funtojn kaj frankojn de ĉiuj "privataj" kaj eĉ de oficialaj eksterlandaj interesitaj rondoj. Ne laŭ certa principo, tiel ke la partion A subtenos la dolarfondaĵo, dum la partion B la konkuranta funtfondaĵo. Kial tia puritaneco? Ĉiuj partioj anoncos sin ĉe ĉiuj interesitoj, kaj . . . "maaleŝ!" (ne gravas!) — ricevos de ĉiuj.

Poste la informservo sciigos, ke la partopreno en la elektoj estis maksimumprocenta. Tio signifas, ke ĉiu stratiranto, ricevinte piastron, propravole iris al la urno, dum tiu, kiu ne ricevis, estis perforte kondukata tien. Kaj la sama "ŝabab" (la "ora junularo") kun la stratbuboj, kiuj foje voĉdonis por ĥavaĝa (sinjoro) Kuŭatli kaj poste por kolonelo Zeim kaj antaŭ nelonge por kolonelo ŝiŝakli, volonte denove voĉdonos por iu taŭgulo, kiu sukcesos prezenti novan amuzplenan "fantazion". — Maaleŝ! Kial ne?

Tamen du-tri koloneloj ne invititaj en la novan kabineton kun tri-kvar ne promociitaj oficiroj restos flanke de la "nova ordo". Ili ne restos sidantaj en ripozo. Ĉu ili ne estas patriotoj? Ili ne povas konsenti kun la nova nedemokratia konstitucio. Ili ne permesos, ke senmeritaj personoj kondukos la ŝtatan direktilon! "Bukra fil miŝmiŝ!" (Morgaŭ post abrikot-

regalo — t. e.: neniam!). Ili ekkonspiros. Ili vizitos kelkajn eksterlandajn firmojn (armilvendajn, kompreneble), certajn agentejojn, interesigos kelkajn nekontentajn fremdlandajn rondojn. Kaj — Inŝ-Allah (kun Dia helpo!) — post kelka tempo maturiĝos nova "puĉo" (germane: Putsch — tumulto). La historiarado ripetos la turniĝon.

Ĉio tio verdire entute ne embarasas la eksteran mondon kaj povus eĉ esti sufiĉe amuza, kiel en la gajaj operetoj de Em. Kálman. Sed estas tre strango poste legi en la eŭropaj ĵurnaloj iliajn komentojn pri la okazintaĵoj. Precipe orekfrapa estas ilia terminaro: "La nova partio" aŭ "Reformo de la edukado" aŭ "Aŭtonomio de Latakia regiono". La mezorientajn cirkonstancojn ili mezuras per eŭropaj mezuriloj. Tio estas, kvazaŭ oni provus mezuri distancon per kilogramoj. Kaj la ĵurnaloj sincere sed naive parolas pri "La movado de kolonelo X." aŭ pri "la orientado de ĥavaĝa Y." aŭ, kio estas pli naŭva, pri "la politiko de la nuna damaska reĝnestro". Ĉar, ĉu konvenas la termino "partio" por interesgrupo? En la araban lingvon epenetris la nova fremdvorto "reformo". Oni tro ofte aŭdis konsilojn kun tiu esprimo. Sed en la damaskaj rondoj ĝi akiris tute alian signifnuancon: utilo. Kaj kion signifas "aŭtonomio"? Ke la regionaj tributoj apartenas ne ekskluzive al la ĉefurbaj paŝaoj sed ankaŭ al la lokaj eminentuloj. Ĉu oni povas serioze paroli pri "movado", kiam temas pri entreprenoj, pri "orientiĝo", kiam temas pri enspezebloj kaj oficoj sen laboro, pri "politiko", kiam temas sole pri nekaŝita monavido? En mondangulo, kie la sola agaddevizo estas: "Hath masari, bas! — Donu la monon kaj fino!

## Vivo frustras . . .

*De L. C. Deij*

### Abioj

Ĉu direble, kiel kantas la abioj?  
Devas esti pro eternosento.  
Ĉar per tiuj multaj miloj da folioj  
ĉiuj tempoj post la prasilento  
laŭdis la sentempan de la Kreo.  
Sub ilia kant' mi sentas min pigmeo.

Se interna ŝtormo miajn sentojn skuas  
kaj ribelas la flamanta koro,  
en la malvarmeta ombro mi genuas,  
ĝis la granda, bonfartiga fioreto  
preĝsolene en la kor' resonas . . .  
ĝis la altaj, verdaj kronoj min pardonas.

☪

### Najtingalo

Dormonta arbaro, vespera kvieto;  
flugas sur pinton orfa birdeto.

La lumo hezitas sur flava genisto.  
Aŭdu, nun kantas mia solisto.

Ĝi diras la larmojn de mia animo;  
mankas al hom' tiom pura esprimo.

Sed kreskas interne malnova kontento:  
esti sen pensoj, preskaŭ nur sento.

☪

## Pensoj pri tradukado de poezio

De M. C. Butler

Kun la plimulto el tio, kion tiel elokvente diras sro Auld en nro 1/1951 de MR, mi tutkore konsentas. Aparte min plaĉas liaj vortoj pri "inspiro" (p. 10), pri la neceso de disciplino kaj aliaj kriterioj (p. 12), kaj la diro, ke neoficialaj vortoj estas iufoje necesaj sed estu maloftaj.

Mi skribas nek por piki nek por kontraŭbatali sron Auld, por kies talento mi havas grandan respekton. Lian vidpunkton mi plene komprenas kaj iugrade simpatias. Tamen ekzistas alia flanko de la afero, ankaŭ atentinda.

Al mi ŝajnas, ke citante min (p. 12) li iom misprezentas mian penson. Mi verkis milpaĝan esploron pri diversaj lingvaj demandoj. De tempo al tempo unu el tiuj paĝoj aperas en *British Esperantist*. En unu el ili, aludante la temon *Poezia Fakvortaro*, mi rimarkigis, ke Kalocsay proponas amason da neologismoj (sub la preteksto, ke ili estas fakaj vortoj, same necesaj por la poeto kiel aliaj fakaj vortoj por aliaj fakuloj) sed ke aliaj esperantistoj esprimis kontraŭan opinion. Jen simpla konstato pri fakto; diskuton pri la temo mi promesis por estonta paĝo.

Nu, por muzikisto fakvortoj estas ekz. mediante, klefo, tonalo, enharmona, kvinto — por poeto heksametro, trioletto, asonanco, cezuro. Sed ĉu elpensi pigra anstataŭ malbela (aŭ eble malvigla) kaj primavero anstataŭ printempo estas uzi terminojn teknikajn — aŭ nur kaŝi sian penson?

Mi estas simpla angla esperantisto, kiu lernis Esperanton sed nenian alian lingvon. Mi legas (p. 17) "sonorila tristo" kaj nature pensas pri la angla *tryst* (rendevuo). En la proksima linio mi legas "la brutoj lante paŝas" (ĉu rilatas al Lanti?). Se la poeto skribus peze paŝas, li ne nur gajnus aliteracion sed estus ankaŭ komprenebla. Oni ne diru al mi, ke mi devus lerni la francan lingvon, kaj tiam mi komprenus *trist*, aŭ ke se mi sciis la hungaran(?) lingvon, mi povus diveni la signifon de *lanta*. Ĉu necesas esti poligloto por

kompreni esperantan poezion? Mi ne kontraŭbatalas la apartan vorton *trista* sed parolas ĝenerale.

Se poeto enŝovas neologismon en ĉiun duan linion, li efektive ne riĉigas la lingvon sed verkas en propra dialekto, kiun la ordinara esperantisto ne komprenas. Li do ne miru, se neniu legas liajn majstraĵojn. Kaj se li protestas, ke nur tiumaniere li povas traduki, eble estus pli bone, ke li ne tradukus, ĉar li riskas, ke aliaj lin imitos — kaj ankaŭ proze; kaj tiel oni perdus por ĉiam la klaron kaj facilon kaj ĉarmon, kiun donis al esperanto la genio de Zamenhof (vidu la faman leteron al Borovko) kaj konstruus por ni vortaregon, kion Zamenhof tiel lerte evitis. Ĉar estas multe pli facile semi lolon ol ĝin ekstermi.

Mi mem, estante anglo, ne povas sen vortaro plene kompreni la poemojn de Burns, ĉar Burns ordinare verkis ne en la normala angla lingvo sed en skota dialekto. Por ke anglo lin komprenu, li devas konsulti la ampleksan vortaron de tiu dialekto en la fino de la volumo. Tradukante *Ca' the Yowes*, ekzemple, mi nature divenis, ke Burns volis diri *Call the Ewes* (Voku la ŝafinojn). Nur per la vortaro mi citrovis, ke li vere diris *Pe lu la ŝafinojn*.

Se aŭtoro por traduki devas elabori dialekton nekompreneblan por la esperantistaro, ĉu li rajtas diri, ke li "tradukis" en esperanton? La vera majstro estas tiu, kiu scias ekspluati la kapablojn de la lingvo, respektante ĝian spiriton, ne tiu, kiu kreas por si propran vortaron.

Kiam mi estis knabo, mi volis esti artisto. Sed neniel mi kapablis desegni. Dum kelka tempo mi elspezis mian poŝmonon por amasigi farbon kun 60 koloroj, eĉ altprezaj. Sed mia mallerta mano ankoraŭ restis tute nekapabla pentri bildon. Tamen vera artisto povas per kelkaj strekoj, eĉ per unukolora sepiaĵo, krei majstraĵon. Mi ja ne rekomendas, ke artisto uzu nur unu koloron, nek ke poeto sin limigu je 500 vortoj. Tamen genio sin montras en la uzo de la materialoj, ne en ilia nombro.

Mi ne konsentas, ke radikoj unufoje uzita per tio jam eniris la lingvon kaj ne plu estas neologismo. Dek mil vortoj, iam



uzitaj de nesperta komencanto aŭ eksperimentema teoriulo aŭ senpensa fuŝulo aŭ senzorga eminentulo feliĉe ne trovis ĉe ni hejmon.

Al mi ŝajnas, ke neniu lingvo (eĉ ne esperanto!) "povas ĉion kapabli". Ĉiu lingvo havas proprajn belajojn, proprajn ecojn; en ĉiu lingvo (ankaŭ en esperanto!) troviĝas aferoj ne tiel bone esprimeblaj en alia lingvo. Oni ne atendu, ke iu aja lingvo perfekte esprimu ĉiun nuancon de ĉiu alia lingvo.

Mi ankaŭ hezitus diri, ke esperanto estas "supermezuro riĉa je rimoj". Klare, lingvo 5.000-radika ne povas rime konkuri kun lingvo 50.000-radika. Sed mi tamen ja dirus, ke pro sia strukturo kaj vortorda libereco esperanto estas multe pli riĉa je eblaĵoj ol aliaj lingvoj. La lertaj ekzemploj de rima jonglado enklitika (ekz. Kies, do, la / voĉo mola ?) sur paĝo 14—15 estas vere lertaj. Sed nur okaze tio eblas.

En la angla lingvo la plimulto el la vortoj estas unusilabaj, en esperanto tre malmultaj. El tio sekvas, ke parole esperanto estas iom pli "longa". Tion oni povas facile kontroli per kalkulo de silaboj; mi tion ofte faris pro mia intereso pri steno-grafio. Sed la iom pli longan parolon kompensas pli granda kompreneblo. Oni ne povas havi ĉion samtempe. Vere, kiel diras Auld, oni ofte povas en esperanto elcerbumi formojn pli koncizajn. Sed tio same eblas ankaŭ en la angla.

Efektive, ne ĉiu metro kaj ĉiu ritmo egale konvenas al ĉiu lingvo. Esperanto estas lingvo esence ina, la angla esence vira. Do ofte okazas, ke esperantigo de angla poemo laŭ sama metro estas farebla nur malfacile aŭ tute ne sen multa elizio kaj monotona ripeto de vi, li, mi... Eĉ Zamenhof ne sukcesis doni al ni brilan tradukon de God save the king! (FK 329). Simile la angla lingvo ne tre konvenas por versoj heksamotraj kaj aliaj.

Tion dirante mi neniel neas la kapablon de esperanto fari tradukojn tre belajn kaj valorajn. Ili ja ekzistas! Mi nur atentigas, ke por malsamaj lingvoj konvenas malsamaj metroj.

Mi ne nomas min poeto. Sed dum 45 jaroj mi tradukis aŭ verkadis du mil poemojn aŭ tradukojn en esperanto. Mi do ne estas "novbakito, sen sufiĉa sperto". Mi ja konscias kaj

ŝatas la mirindajn eblaĵojn de esperanto. Sed mi konas ankaŭ ĝiajn limigojn. Iam, defio al ili, mi mem provis verki "ŝajne nefareblan taskon", verkante am-"poemon" kun linioj unusilabaj — certe unikaĵo en esperanto! Mi citu la komencon:

Li,	La	Kis'!	Iia!
ŝi,	du!	Ibis!	Nu!

kaj la finon ("aj" esprimas lamenton):

Se,	Kaj	Aj!	Ho	do,
ne,	for	por	ve,	tre!
	ŝi,	li!		

Sed tiun metron mi ne rekomendas al niaj poetoj, kaj mi ne atendus el ĝi majstrojn.

Ĉu traduko estas pli bona ol la originalo? Ĉe poemo tre malofte. Traduki poemon el unu lingvo en alian estas tasko malfacila. Nececas esti mem poeto samgenia. Krom tio oni estas katenita ne nur de pensoj fremdaj sed ankaŭ de ritmoj kaj rimoj naturaj en la originala lingvo, tamen ne troveblaj aŭ ne uzoblaj en la dua... Sen eksterordinara talento kaj okaza bonŝanco aŭ eĉ "inspiro" la traduko preskaŭ certe iom perdos aŭ aldonos, kaj ĝi estos ĝenerale malpli kontentiga kaj fluos malpli nature ol poemo originale verkita sen tiuj katenoj.

Ne malpli ol sro Auld mi amas la esperantan poezion, kiam ĝi estas vere bona. Kaj ankaŭ mi aspiras al Parnaso, kvankam sen espero ĝin atingi. Kaj unualoke al mi mem mi adresas la konsilon, kiun mi ofte donis al aspirantoj:

CELU ALTEN! Esprimu vian penson kiel eble plej trafe. Ĉiun vorton kritike pesu, laŭtleĝu kaj poluru. Fine, ne eldonu vian poemon sed ĝin formetu en ŝrankon. Post sufiĉe longa tempo ĝin reprenu, relegu, rekritiku kaj repoluradu. La procedo estas senfine ripetobla.

Pli bone estas verki unu majstrojn ol cent ordinaraĵojn. Oni skribis pri la poeto Poe: "Li venas al ni kun tre maldika paperujo sub la brako, sed ĝia enhavo estas de la plej alta

kvalito." Celu meriti la saman laŭdon. Eĉ se vi sukcesos verki ion vere bonan, neniu vin laŭdos: neniu eĉ komprenos vian strebon. Sed tio estas afero negrava. Estu senkompata por vi mem: metu antaŭ vin eĉ netrafeblan alton de perfekteco kiel idealon kaj celu ĝin atingi por propra kontentiĝo. Literatura ne estas nur literaturo!

**Red. rimarkigo.** Ĉar la supra artikolo estas diskutata, estu permesate al mi aldonu kelkajn vortojn. La nova poezia vortprovizo ofte ŝajnas al mi malfortigi la impreson de poemoj. La novaj vortoj estas malpli imagokreaĵaj, tial efikas malpli forte, ol vortoj en poezio devas efiki. Tamen estus sensece diri, ke neniu el tiuj vortoj per uzado povos viviĝi kaj resti vivaj. Ĉiuj vortoj en esperanto viviĝis ja per la uzado. — La rezonado, ke homo, kiu konas nur sian nacian lingvon kaj esperanton, ne komprenas aŭ miskomprenas la novajn poezivortojn, ne estas bona argumento. Se oni jam lernis la precizan esperantan signifon de kelkaj miloj da esperantaj vortoj, el kiuj multaj similas al naciaj vortoj kun tute aliaj signifoj, oni certe povas lerni la signifon de ankoraŭ kelkaj proponataj vortoj. Ĉiu progresinta esperantisto scias aŭ povas facile ekscii, kie troviĝas listo de tiaj vortoj. Kaj se iu poeto uzas vorton tute novan, li certe klarigas kaj la devenon kaj la signifon.

Mi kredas, ke diskutado pri tiu punkto de la temo — neologismoj — estas preskaŭ senseca (post la multa diskutado, kiu jam okazis). Homoj kun emo kaj kapablo por krei poezion prefere verku poemojn kiel eble plej bonajn, sen aŭ kun novaj vortoj. Nur tiel estiĝas literaturo.

S. E.

## Kio estas feliĉo?

*De Einar Hult*

Mi ricevis leteron de franco. Jam sur la unua paĝo mi trovis kelkajn proverbojn, kiuj altiris mian intereson. Bone ili ates-

tis pri la gvidsteloj en la filozofado de la franco. Jen mi prezentas ilin. "Per vorto ĝentila ĉio estas facila". — "Afabla vorto pli atingas ol forto". — "Geedzoj en paco vivas en reĝa palaco". — "Proverbo estas sperto, proverbo estas averto". Tro belaj kaj lernigaj proverboj, ĉu ne? Se ni vivus laŭ ili, ni eble atingus la feliĉon, kiun la franco kaj lia edzino atingis en sia geedzeco. Sube mi prezentos la parton de la letero, en kiu la franco rakontas pri la propraj spertoj tiurilate:

"Mia edzino kaj mi, ambaŭ ni klopodas kiel eble plej harmonie rilati en la ĉiutaga vivo. Kiel regulon ni starigis la rideton. Nenia konflikto estiĝas inter ni. Ĉiam ni sukcesas eviti akrajn vortojn, malmildajn parolojn. Ni arde volas starigi pacon en la hejmo kaj viviĝi en nia sinteno, en nia konduto: filozofion tute praktikan. Nia idealo, iagrade, estas ebligata konkretiĝi. — Tial, ne laciĝante, ni ĉiutage, de mateno ĝis vespero, aplikas de ni elektitajn vivregulojn. La sukceso nin rekompencas. — Mi devas tuj konfesi, ke ni ĉerpas multe da helpo el libroj kaj revuoj. Mi nur bedaŭras, ke tiuj libroj estas franclingvaj.

Sed bonvolu ne pensi, ke ni atingis ian absolutan, senliman feliĉon. Tion ja ne permesas al ni nia malperfekteco. Sed ni luktadas ĉiumomente por nia feliĉo, kaj tiel ni malkovras verajn riĉaĵojn — la spiritajn. Konsciante, ke ĉiu homa estaĵo ilin bezonas, ni estas pretaj montri al la bonvolemluloj la vojon de kiel eble plej malgranda malfeliĉo. Kiam mi tion ĉi skribas, la ideo naskiĝas en mia kapo. Jen: ĉu vi povus demandi al viaj kulturondanoj, kion ili opinias pri la feliĉo? Estas vere diskutinda temo."

Kiel verki respondon, kiu kontentigos la cititan francan? Ĉu entute eblas respondi al la demando, kio estas feliĉo? Tiu vorto havas tre vastan signifon, kiu eĉ varias laŭ la postuloj kaj idealoj de ĉiu unuopa homo. Kun certa ĝojo mi tamen notis, ke la francaj geedzoj trovis aŭ almenaŭ provis trovi la ĝustan melodion por krei kaj konservi la feliĉon en sia geedza kunvivado. Sed kiom multaj sukcesos same bone kiel ili? Granda estas la nombro de homoj, kiuj emas konsili al nespartuloj la vojon, kiu estas irenda por trovi la feliĉon. Sed

ĉu la konsiloj estas praktikeblaj ĉio kaj ĉiam? Bedaŭrinde ne!

Kiam temas pri la feliĉo, la individuo mem ne povas fari multon por krei kaj realigi ĝin! Unue ni kiel membroj de socio devas respekti kaj sekvi la "regulojn", kiujn ĝi starigis. Nur malofte ni rajtas sekvi la voĉon de nia propra konscienco. Per alia vorto, ni devas agi tiel, kiel la socio aŭ la homoj atendas de ni. Ankaŭ la envio de niaj kunhomoj influas por detruji la plej belajn intencojn! Per malbona parolo aŭ klaĉo la "aliaj" homoj povas ombri nian feliĉon. Ĉu mi eventuale tro pesimiste rigardas la ŝancojn fariĝi feliĉa? Sed ĉu ne estas tiel, ke ĉiuj homoj ĝenerale dum la tuta vivo serĉas la feliĉon kaj tamen ne trovas ĝin?

Por ilustrati mian rezonadon mi volas rakonti historion pri potenca reĝo, kiu vivis en Oriento. Li estis posedanto de multaj riĉaĵoj, fama pro siaj scio kaj saĝeco, ĉirkaŭita de brilaj kaj kuraĝaj viroj, belegaj virinoj kaj miloj da servistoj, honorata kaj amata de sia tuta popolo, prosperinta en ĉiuj siaj entreprenoj, sukcesega persono. Sed ĉu li tamen sentis sin feliĉa? Ne, kvankam li havis la eblecon ĉiumaniere kontentigi siajn postulojn pri lukso kaj amuzoj, li tamen trovis la vivon senenhava kaj teda.

Des pli facile ni povas kontentigi niajn dezirojn, des pli teda kaj senenhava ŝajnas la vivo. Riĉeco en si mem ne estas garantio por fari nin feliĉaj. Kelkfoje malsukcesoj estas necesaj por vekti nin el la dormo de pasiveco, kiu estas sekvo de ĉiama sukceso. Pli grandan ĝojon kaj feliĉon donas al ni sukceso, kiun ni pene akiris. Ĉu malriĉa infano ne pli feliĉas pro la ricevo de modesta donaco ol la infano de milionulo, kiu ricevas luksan aŭton? La infano de la milionulo neniam sentis la mankon de io, kaj tial ĝi ne povas senti ĝojon pro la plej brila donaco!

"Per vorto ĝentila ĉio estas facila" tiel sonis unu el la proverboj. Sendube estas agrable renkonti kaj konatiĝi kun ĝentilaj homoj, kiuj malavare disdonas ĝentilaĵojn, sed ĉu ni ĉiam estu ĝentilaj? Ĉu ne troviĝas okazoj, kiam ni ne estu ĝentilaj sed diru tion, kion ni pensas pri la amiko? Mi pensas pri okazoj, kiam niaj amikoj faris ion, kion ili deziras, ke ni

kritiku. Ĉu ni ĝentile laŭdu ilin, kvankam ni en la profundo de la koro rigardas la faritaĵojn kiel fuŝaĵojn? Kompreneble niaj amikoj preferas la ĝentilaĵojn kaj eble sentas sin feliĉaj pro la sukceso. Sed ĉu ni mem havas kialon senti nin same feliĉaj?

Per afabla vorto ni tamen povas mildigi ne nur eventualan kritikon sed ankaŭ la tutan vivon de niaj kunhomoj. Ofte ni renkontas homojn, kiuj ĉiam sentas sin malfeliĉaj. Jes, neniam ili montras la plej belan flankon de la vizaĝo. Se ni kredus ilin, la tuta vivo estus ĉeno de malsukcesoj kaj malĝojoj. Al tiaj homoj ni rekomendu sekvi la konsilon kaj ekzemplon de niaj francaj ĝeamikoj, nome lerni la arton renkonti ĉiun malsukceson kun rido sur la lipoj. Malfacila sed nepre necesa leciono, se ni deziras konservi la propran feliĉon kaj pligrandigi la feliĉon de niaj kunhomoj!

"Geedzoj en paco vivas en reĝa palaco". Belega proverbo, ĉu ne? Sendube ĝi indikas vojon, kiu kondukos nin al feliĉa kaj harmonia kunvivado. Sed, kiel mi jam skribis, la paco povas esti ĝenata kaj minacata de la envio de niaj kunhomoj. Se via feliĉo kondukis vin al la "sepa ĉielo", troviĝas risko, ke via propra feliĉo vekis la envion de personoj, kiuj emas krei disharmonion kaj tiamaniere detruji vian feliĉon. Troviĝas proverbo, kiu diras, ke la morto de unu estas la pano de alia. Mi tamen volas fini mian artikolon per la espero, ke neniu ombro baru la vojon de niaj francaj ĝeamikoj por atingi la feliĉon, kiun ne nur ili aspiras.

## Debato

*Respondeco de individuo kaj ŝtato.*

". . . ĉu ĉiuj unuopaj germanoj estas kolektive kulpaj pro la krimoj faritaj de germanoj dum la lasta milito . . . ?"

Ne. Tute certe ne. Diru la kontraŭon estas elmontri faŝistan sintenon. Neniu tuta nacio respondas pro la faroj de ĝiaj soldatoj kaj aliaj nehomigitaj civitanoj.

Mi konas germanajn samideanojn, kiuj neniam levis la manon en hitlera saluto kaj kiuj multege suferis dum la hitlera reĝimo.

Kiel farmulo iam diris: "Ili estas tiel respondaj, kiel mi ne estas respondebla pro nia aĉa registaro!"

La agoj de anoj de Irgun Ecel estas ĝuste tiel kondamnindaj kiel tiuj de aliaj hommortigantoj, se oni povas kulpigi homojn, kies agoj estas deciditaj de kondiĉoj, kiujn ili mem tute ne komprenas nek povas regi (pro nescio).

Neniu registaro respondas pro la militado, ĉar neniu registaro estas sendependa de la superregistaro de la financo, nek hebreoj nek germanoj nek... kiuj kiel registaroj aŭ popoloj havis rektan rilaton al la lasta mondmilito aŭ la buĉado en Israel. La sola respondebla estas la financo.

Sincere

J. W. Leslie. (Anglujo)

*Red. rimarkigo.* La vorto financo signifas en esperanto monaj rimedoj de ŝtato aŭ privatulo; ŝtato de en- kaj elspezoj, fako de tiu, kiu sin okupas pri monaj aferoj; arto profitigi monon. En la supra eldiro la senco de la vorto ne estas difinita. Laŭ la uzado en naciaj lingvoj ĝi verŝajne plej rilatas al la arto profiti monon. Sed tiu arto aŭ la ekonomia sistemo ne povas esti respondebla pri io ajn, ĉar respondebla povas esti nur libere kaj konscie aganta estaĵo. Oni povas nomi la profitigarton aŭ la sistemon kaŭzo, sed tiu kaŭzo estas eco aŭ produkto de homoj, kiuj almenaŭ en ioma grado estas konsciaj pri siaj agoj kaj elektas la agmanieron. Verŝajne la vorto financo tie ĉi do signifas kapitalistojn, precipe tiujn kapitalistojn, kiuj decidis pri la uzo de la grandaj kapitaloj.

Tiaj homoj multfoje ebligas militojn, certe kelkfoje ankaŭ instigis al militoj, kaj en tio estas granda respondeco. Sed la homoj, kiuj sekvas la instigon kaj akceptas prunton por povi militi estas siavice nepre respondej pri tiuj agoj. Kaj la homoj, kiuj konsentas plenumi la ordonojn de registaroj kaj militgvidantoj, estas siavice respondej pri siaj agoj. Ĉiu homo estas respondebla pri siaj agoj, laŭ sia konscio pri la signifo de

la agoj. Se ni rekonas normon por agado, konscion pri la signifo de la agoj kaj kapablon elekti inter agadmanieroj, io alia ne estas ebla, eĉ ne pensebla. Sed atentu, ke respondeco kaj kulpo estas du diversaj aferoj.

S. E.

### *Ne ĵetu ŝtonojn!*

La artikolo "Meditoj, herezoj kaj oponoj" (MR 2/1951) ebligas tre koncizan respondon pro tio, ke ĝi eĉ ne unu fojon aludis la palestinajn arabojn. Tuj kiam oni enscenigas tiujn malfeliĉulojn, oni povas fari jenan signifan komparon inter Germanujo kaj Judujo:

1. Germanujo volis forpeli kaj fakte forpelis multajn milojn da judoj; Judujo kaŭzis, ke multaj miloj da araboj devis forlasi siajn hejmojn kaj vivi senespere en la najbaraj landoj.

2. Germanujo metis sennombrojn da judoj en koncentrejojn; Judujo lasis al la arabaj rifuĝintoj nenian vivrimodon krom tiu de la koncentrejoj, kiujn kompletplenaj registaroj starigis por savi ilin de ekstermo.

3. Germanujo detruis Lidice, mortpafis la virojn kaj sklavigis la virinojn kaj infanojn; Judujo atakis la araban vilaĝon Dalchin\* kaj mortigis ĉiujn enloĝantojn.

4. Germanujo ekzekutis la senkulpan van der Lubbe; Judujo embuske murdis la senkulpan grafon Bernadotte.

5. Germanujo provis etendi siajn landlimojn, senrajtigante la polojn; Judujo provas ankoraŭ alproprigi al si kiom eble plej multe da tereno apartenanta al la araboj.

Kion oni povas konkludi el tiuj ĉi paralelaĵoj? Ĉu sro Kohen-Cedek volas, ke oni konsideri lin, kiu kompreneble estas senkulpa, respondebla pri tiaj fiagoj? Ĉu li volas, ke oni kulpigi pri ili la tutan Judujon? Se ne, kiel li povas konsekvence malkestimi ĉiujn germanojn sendistinge? Se li tamen provos ĉion senkulpigi parolante pri liberigmilito, kvazaŭ ĝi rajtigus kiujn

\* Bedaŭrinde, kvankam la informo pri tiu okazo siatempe profunde tuŝis min, mi ne bone memoras la nomon de la vilaĝo. Kompreneble mi esperis kaj atendis neadon de la juda flanko, sed vane. Jen kiel kelke da fanatikuloj, miskomprenante la patriotismon, povas makuli la kronikon de granda popolo!

ajn kruelaĵojn aŭ maljustaĵojn — ĉu la araboj, kiujn ili nun regas, havas la saman sanktan ribelrajton?

Mi ne pledas por Germanujo, kiu en la unua mondmilito mortigis mian patron kaj en la dua detruis mian naskiĝurbon, nek mi bedaŭris, kiam mia "imperialisma, popolon subpremana" patrujo finfine rezignis pri la sendanka provo krei araban-judan Palestinon; mi deziras nur memori pri la proverbo: "Kiu loĝas en vitra domo ne ĵetu ŝtonojn!"

D. B. Gregor. (Anglujo)

### *Kion ĝis nun Ameriko ne donis.*

Sro Régulo Pérez miras, ke la mezamerika kaj la sudamerika kulturoj ne donis kiel multaj eŭropaj ŝtatoj grandan originalan kontribuon al la mondkulturo.

Li diras, ke li ne volas paroli pri la nordamerika kulturo. Sed se li estus komparinta la historion de la nordamerika invado kun la sudamerika, li certe ne bezonus miri pri la malgranda kontribuado de la latinida kontinento.

La loĝantoj de Nordameriko devenas de homoj, kiuj forlasis sian hejmlandon, ĉar ilia spirita libereco estis minacata, aŭ ili estis laboremaj homoj, esperantaj trovi per laboro pli bonan kaj pli riĉan vivon en la nova, virga lando. Ĉiokaze la invadantoj devis peze labori por povi ekzisti. Ili kreis tradician respekton al la laboro.

Kontraŭe la invadantoj de meza kaj suda Ameriko venis kiel militaj konkerantoj por ekspluati la riĉecon de malnova kulturo kaj vivis per subpremado de la indiĝenoj. Ili fariĝis supera klaso kaj ricevis ĉiujn malbenaĵojn de ne laborantaj homoj. Tiaj malbenaĵoj restis dum multaj generacioj kaj kun diversaj efikoj.

Sro Pérez nomas Finnlandon kaj Karelion kiel mirigajn ekzemplojn. Sed li devas memori, kia stimulo por finnlandanoj estis la kunvivo kun la sveda kulturpopolo kaj kian laboron por la sveda kulturo la finnlandanoj faris. Poste ili

devis labori por liberigi sin de la sveda kulturo kaj krei sian propran. La libera laboro kreas grandajn homojn.

Nils Christensen. (Norvegujo)

## Lingvaj sugestoj

### *Israel.*

La supra skribmaniero de la nomo de la juda ŝtato aperis en MR per kontribuoj de judaj kunlaborantoj. Rimarkinte la diferencan inter ĝi kaj la ĝis nun uzita mi demandis du judajn kunlaborantojn, ĉu ĝi respondas al la cifaro en la hebrea. Ili diris, ke jes. Kaj la oficiala nehebrea skribmaniero de la ŝtato mem estas Israel. Ĉu tiuj du faktoj ne estas motivo por la sama skribmaniero en esperanto? Estas nur demando, ne propono. Ke rusoj kaj angloj kaj verŝajne iuj aliaj popoloj diras z anstataŭ s apenaŭ estas kaŭzo por uzi tiun elparolon en esperanto. Sed la formo en la esperanta biblio kaj la ĝisnuna uzo? Ĝi meritas seriozan konsideron. Tamen ŝajnas al mi eble konservi la malnovan formon por la biblio kaj bibliaj rilatoj kaj uzi la formon Israel por la nova ŝtato. Kiel dirite: estas demando, ne propono.

### *Ameriko — Usono.*

En naciaj lingvoj oni ofte uzas la nomon Ameriko anstataŭ Usono. Tiu uzo estas ne nur erara sed kelkfoje embarasa. Legante aŭ tradukante oni efektive ne ĉiam scias, ĉu temas pri la tuta kontinento aŭ pri Usono. Estas pli bone uzi la vorton Usono, kiam ni parolas pri la ŝtata federacio, kaj rezervi la nomon Ameriko ekskluzive por la kontinento.

### *Skriba emfazo de sento kaj senco.*

Por plifortigi la impreson de siaj vortoj iuj verkantoj skribas vicojn da punktoj, strekoj, demandsignoj kaj elkriaj signoj, kaj por atentigi pri la senco de la vortoj ili substrekas aŭ skribas majuskle aŭ majuskle kun substreko, kaj ankaŭ la substreko povas esti de du aŭ tri specoj. Mi vidis manu-

skriptojn laŭ kiuj la kompostisto devus sur unu paĝo kaj tre ofte komposti en kvar, kvin diversaj manieroj.

Tia skribmaniero ne estas rekomendinda, nek esprime nek tipografie. Se mi metas vicon da punktoj, strekoj, demandaj aŭ elkriaj signoj post certaj sentencoj, tio montras, aŭ ke mi ne fidis al la efiko de miaj vortoj, ke tiuj estas nekontentigaj, aŭ ke mi konsideras la legantojn ne kapablaj bone kompreni la signifon de la vortoj. Tamen la legantoj tre ofte komprenas tiujn du motivojn, kaj ilia prijuĝo ne estas flata por la verkinto. Ordinare la vortoj estas kontentigaj, kaj la trouzo de signoj estas nur emo al efekto.

Skriba esprimado estas bona, nur se la vortoj mem esprimas tion, kion ni volas diri. Kion ni ne kapablas esprimi per vortoj, tion ni ankaŭ ne kapablas esprimi per kelkaj sentoidikoj signoj. Sed temas ne nur pri utilo aŭ neutilo. Esence temas pri verkarta etiko, pri ĝusta kaj neĝusta, pri perfekta kaj neperfekta.

Kursivo aŭ alimaniere emfazo de vorto estas necesa, nur se propozicio povas ricevi alian interpreton sen tiu akcento de certa vorto aŭ se estas necese emfazi unu aferon por apartigi ĝin de alia. Tiaj kazoj estas tre maloftaj. Ĝenerale la legantoj pli bone legas la tekstojn kaj perceptas la enhavon sen tiuj atentoidikoj, kiuj pli konfuzas la pensadon ol helpas ĝin.

Sed ankaŭ la tipografio estas atentinda. Paĝo kun multe da diversaj litertipoj aŭ vicoj da strekoj kaj aliaj signoj ne estas bela. Ju pli unueca kaj trankvila libropaĝo estas, des pli bela kaj bonkvalita ĝi estas, se ĝi cetere estas bone farita. Kaj tio helpas al la legado pli ol diversmaniera emfazado.

#### *Esprimoj el fremdaj lingvoj.*

En la naciaj lingvoj multaj aŭtoroj ŝatas tie kaj tie miksi la gepatran lingvon kun esprimoj kaj frazoj el la latina kaj aliaj lingvoj. Ĉu tio estas imitinda aŭ ne? Al mi ŝajnas, ke oni ne povas respondi per decida jes aŭ ne sed ke la demando estas nepre atentinda.

Kant uzas en *Kritik der reinen Vernunft* iom da grekaj kaj latinaj terminoj kaj esprimoj. La kauzo estas simpla kaj ne bezonas defendon. La grekaj kaj latinaj terminoj jam ekzistis

kaj havis klare difinitan sencon. Multaj el ili ne havis ekvivalentojn en la germana, kaj kiam germanaj vortoj troviĝis aŭ estis adopteblaj, li foje devis per latinaj terminoj determini la precizan signifon, kiun li donis al la germanaj vortoj. Uzo de latinaj vortoj do estis afero necesa kaj krome eĉ avantaĝa: li skribis ne por vasta amaso sed por eruditaj homoj, kiuj bone sciis latinon, kaj por ili la fremdaj vortoj eĉ faciligis la studadon.

Iometo alia estas la uzo de fremdlingvaĵoj ĉe Schopenhauer. Li abunde citas frazojn el la latina kaj la greka kaj krome el la novtempaj kulturlingvoj. Tiuj citaĵoj ne estas nepre necesaj por la prezento de lia propra filozofio. Sed ankaŭ pri li oni certe povas diri, ke li verkis por publiko, kiu bone komprenis almenaŭ la pli grandan parton de la fremdlingvaĵoj. Kaj tial la fremdlingvaj sentencoj, plenaj de senco aŭ poezio, estis pensostimuloj, kiuj efikis multe pli ol estus farinta simpla pensoredono en la germana lingvo.

Sed se nuntempaj homoj, kiuj scias eble neniun el tiuj fremdaj lingvoj, legas verkojn de Schopenhauer, kaj tio ja okazas, la citaĵoj pli ĝenas ol helpas. Eĉ se notoj klarigas ilin, multaj legantoj opinias, ke Schopenhauer estus aginta pli saĝe, se li estus doninta la enhavon de tiuj frazoj per sia bona germana lingvo. Kaj el sia vidpunkto ili certe pravas.

Se nuntempa aŭtoro verkante por relative vasta publiko tiel skribus, tio estus snobismo aŭ stultaĵo. Tamen oni jen kaj jen eĉ multaj aŭtoroj renkontas esprimojn aŭ frazojn el la latina kaj el la novtempaj kulturlingvoj. Oni ne rajtas ĝenerale kondamni tion. Ĉe la inicito la aŭtoro per tia esprimo, se ĝi apartenas al la enhavoriĉaj kaj estas ĝuste uzata, povas viviĝi tutan idekomplekson. Se la valoro ne estas tiel granda, tiaj citaĵoj tamen ofte ŝajnas agrabla spico. Sed ne malofte ili ŝajnas neniel pravigeblaj, kiam oni kritike analizas la tekston.

Se oni emas uzi tiajn ornamaĵojn, estas bone konsideri, ĉu ili pli bone servas al la publiko ol esprimo aŭ frazo en la ordinara lingvo.

Tiuj vidpunktoj pri fremdlingvaĵoj estas aplikeblaj ankaŭ

al ordinaraj citaĵoj uzataj por la sama celo (kompreneble tio rilatas ne al citaĵoj necesaj en rezonado). Multaj prelegantoj kaj aŭtoroj, eĉ inter tiuj, kiuj estas konsiderataj tre eminentaj, uzas tiom da citaĵoj, ke la parolado aŭ la verkaĵo ŝajnas kompilaĵo.

Fremdlingvaĵoj kaj citaĵoj estas kelkfoje pravigeblaj, aliffoje ne. Ĉiuokaze ŝajnas al mi, ke estas bone zorge atenti pri sia lingvo ankaŭ en tiu rilato.

Sed pli bela ol belsonora fremdlingvaĵo kaj pli bona ol enhavoĉeza citaĵo de geniulo estas propraj vortoj, kiuj esprimas propran penson.

S. Engholm

## Literaturo

Thor Heyerdahl; Ekspedicio Kon-Tiki.  
Tradukis: C. Brynildsen.  
Lingvo prilaboris: Stellan Engholm.  
Eldonis: Eldona societo Esperanto; Stokholmo.  
Formato 16×23 cm, 208 paĝoj, 60 fotolustraĵoj. Bindita.  
Prezo: sv. kr. 16.75.

En nro 3 1948 de MR troviĝis valora kontribuo de Brendon Clark: "De kie venis la polinezianoj". Kiel komplemento sekvis en nro 1 1950 tre interesa artikolo de Thor Heyerdahl mem pri Kon-Tiki kaj la polinezia problemo. La du verkaĵoj bone montras la seriozan kaj sciencan signifon de la fama okmil-kilometra flosvojaĝo trans Pacifikon. Tial mi supozas, ke la libro interesos la legantojn. Mi pripensis ankaŭ, ke ordinare ĉiu hejmosida kaj lokfiksita homo foje havas iom da sopiro al libera kaj liberiga migrado en suno kaj vento ĝis nekonsistaj malproksimoj. Eĉ kvankam oni eventuale asertos, ke estas ne prudente tiamaniere vagadi inter ondoj kaj riski sian vivon, tamen oni kun plezuro sekvas la vojaĝon de la ses viroj, kiuj dum 101 tagnoktoj vivis kune kiel modernaj vikingoj sur 14-metra primitiva trunkfloslo meze sur la senfina solpotenca maro en la centro de la sama eterna, ronda horizonto. La priskribo estas pli ol ordinare viva kaj vigla; ĝi konkretigas

la iluziojn, kiujn ni ricevas el legado; ĝi igas nin partopreni la vivon sur la floslo kaj senti ĝian atmosferon. Oni povas imagi, kiel natura kaj streĉa estas la atmosfero, kiam oni pripensas, ke la viroj malrapide kaj silente drivas antaŭen sur malalta floslo ĉe la akvosurfaco. "Ordinare oni vojaĝas kun motorbruo kaj pistobatoj dum la akvo ŝaŭmas sub la poŭpo kaj ondas ĉe la pruo. Poste oni revenas kaj diras, ke meze sur la maro estas nenio krom akvo. Sur la floslo ne forpasis eĉ unu tago sen vizito de scivolaj gastoj kiuj ĉirkaŭsvarmis ĝin, kaj kelkaj el ili kiel korifenoj kaj pilotfiŝoj sekvis la floslon trans la maron kaj ĉirkaŭnaĝis ĝin tage kaj nokte." La maro havis multajn surprizojn. Kun granda spiritoviglo la aŭtoro kaptis kaj la streĉon de tiuj vidaj surprizoj, kiujn eĉ Walt Disney per sia fantazio ne povus krei, kaj la streĉon de la pli grandaj ventegaj, ŝarkbatalaj kaj averiaj aventuroj. Li same bone kaptas kaj transdonas la imponan belon de la vojaĝo inter ondoj kaj tropika ĉielo. Estas multe pli ol ordinara aventurlibro, pli ol scienca kontribuo al la solvo de etnologia problemo. Alia bona kvalito estas la simpatia kaj sprita bonhumoro en la tono kaj en la rakontado. Bonhumoro estas laŭdinda en vojaĝpriskriboj. Sur la floslo ĝi estis necesa. Nenio estus pli minaca ol la psika danĝero, kiam ses viroj dum monatoj estas kunpremitaj sur drivanta floslo. Tiam bona humoro kaj bona spritaĵo egalas al vivsava veŝto.

La agrabla senĝena rakontmaniero supozigas, ke nenia psika danĝero ekzistus, eĉ se la maro estus malpli interesa.

Rilate al la enhavo sufiĉu la supraj atentigoj. Resumon pri la vojaĝo kaj la ceteraj okazintaĵoj la legantoj jam trovis en la diritaj artikoloj en MR kaj cetere povis trovi jam pli frue en preskaŭ ĉiuj ilustritaj gazetoj de la mondo. Krom tio la libro estas tradukita en diversajn naciajn lingvojn kaj multaj eventuale jam konas ĝin.

La esperanta traduko estas bona, klara, simpla kaj vere esperanta. Mi trovis neniun malbonan stilaĵon. Sole kelkaj vortoj kaj esprimoj ŝajnas iom diskulindaj. La kunskribo de adjektivo kaj substantivo (specialaŭo, gigantombro, malgrandfiŝo) ja estas korekta sed ne plaĉa kaj verdire kontraŭa al la

spirito de ordinara kaj simpla lingvouzo. Prefere oni uzu tiajn kunmetaĵojn nur por signi iun specialan signifon aŭ nuancon. Anstataŭ "tunfiŝo" mi prefere skribus "tuna-fiŝo". La vorto estas tre malofta, kaj eble pro tio mi ne povis elpuŝi el mia konscio la nocion pri la esperanta vorto tun', kaj mi daŭre kaj preskaŭ malespere imagis pezan milkilograman fiŝegon. Tio kompreneble estas subjektiva impresio. Sed ankaŭ kiam mi provas objektivite ekzameni la vorton, mi trovas, ke tuna-fiŝo estas pli korekta transskribo.

Ordinara korektado de manuskripto estas lacige teda afero. Lingva "prilaboro" vere tro ŝarĝas la komplezan kontrolanton kaj devus esti ne necesa por ordinara libro. Estas necese ekscii kiom la tradukinto, kiun ni kore gratulas pro lia kuraĝo kaj iniciatemo, profitis el la korektlaboro de sro Engholm. Ĉiokaze ilia komuna penado donis bonan kaj plezurigan rezulton! La libro, fine, estas tre belaspekta kaj tipografie tre plaĉa. Tio eble estas apuda afero, tamen ankaŭ la aspekto faras la legadon tre facila kaj vere agrabla.

L. C. Dej.

Vilho Setälä kaj Elsi Borg: 1. 2. 3. Peĉjo kaj Anjo kalkulaa.  
Eldono: Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki-K. Finnlando.  
Prezo: 0,42 us. dol. plus afranko (0,09 d.).

1. 2. 3 estas interesa bildlibro kun trikolore presitaj desegnaĵoj, kiuj celas doni vivon al la ciferoj en la imago de niaj plejetuloj. Mia propra filo uzas la libron kun granda plezuro (la bildoj ŝajne tre interesas lin) kaj kun profito. Li jam lernis koncepti la nombrojn, tuj kiam li vidas certan grupigon de objektoj, t. s. li tuj diras la kvanton sen nombri la unuopajn objektojn. Prilingva atentigo: La demando "kiel multajn pomojn vi vidas tie" ĉiokaze estas sence neklara. Devus esti: "Kiom da pomoj vi vidas"? Komputi anstataŭ nombri ŝajnas nebezonata.

L. C. Dej.

Wilhelm kaj Hans Wingen:  
Wir lernen Esperanto.  
Esperanto in der Tasche.  
Eld. Verlag der Limburger Verlagsdruckerei.

La unua el tiuj du libroj de W. kaj H. Wingen (Ni lernas esperanton) aperas en sia tria, prilaborita kaj plibonigita eldono. Ĝi enhavas dekdu lecionojn, sufiĉe ampleksajn. Ĉiu leciono donas certan dozon da gramatiko kun klarigoj, ĉio tro bona kaj pedagogike kaj tipografie, vortliston kaj fine legekercon. La kompono similas al tiu en diversaj germanaj lingvaj lernolibroj por memstudado, de kiuj multe profitis ankaŭ negermanoj. En tiu ĉi la metodo tamen estas tre plibonigita per tio, ke ĉiu leciono estas dediĉita al certa temo (ĉiokaze mi antaŭe ne vidis tion en similmetodaj germanaj lernolibroj), ekz. la ĉambro, domo kaj strato, la urbo, komerco kaj trafiko, korpo kaj sano. Tio estas avantaĝa por la vortlernado kaj la unueco de la legekercoj. — Krome troviĝas en la libro tradudekercoj, kompletigaj lingvaj klarigoj kaj alfabetaj vortlistoj.

MR ne havas lokon por detala ekzameno de tia libro, kaj tia recenzado ne apartenas al la kampo de MR. Resume: la libro ŝajnas al mi praktika kaj nepre faras la lernadon facila. Ĝi same bone taŭgas kaj por kursoj kaj por memstudado, kaj ĝi estas ideala libro por meti en la manon de homoj, kiuj ekinteresiĝas pri esperanto.

La dua libro (Esperanto en la poŝo) estas praktika germanesperanta frazaro (kun kompleta esperanta gramatiko). La frazoj apartenas al ĉ. 80 diversaj temoj kaj ŝajnas bone elektitaj kaj faritaj. La frazaro povas esti bonega helpo al esperantistoj, kiuj vojaĝas en germanlingvaj landoj.

S. E.



Historio de Yukawa teorio.  
Verk. kaj eld. de Natursciencia Fakultato de Osaka  
Univ. 12,5×18 cm, 25 p. Mendobla de Japana  
Esperanto-Instituto, Hongo-Motomati 1-13, Tokio.

Tiu ĉi libreto donas resume la historion de la atomfizika esplorado kaj en tiu kadro prezentas al ni la kontribuon de profesoro Yukawa, kiu ricevis nobelpremion 1949. — Antaŭ la dua mondmilito japanaj sciencistoj pli multe ol alilandaj utiligis esperanton, pri kio elokvente atestas kelkaj paĝoj en tiu ĉi libro sub la rubriko Scienco kaj Esperanto. La libro mem estas atesto pri la sinteno de japanaj sciencistoj rilate al la internacia lingvo, kaj samtempe ĝi estas voko al la esperantistoj, unuavice la sciencistoj, en ĉiuj landoj pri reciproka kaj komuna laboro por la scienco kaj por la bono de la homoj. La kondiĉoj de japanaj sciencistoj estas malfacilaj. Malgraŭ tio ili stimulas nin kaj kontribuas al nia laboro. Des pli ili mem meritas stimulon kaj helpon.

La multaj nomoj en la libro estas bone skribitaj en siaj originaj formoj escepte de unu malfeliĉa specimeno; Neŭtona mekaniko anst. mekaniko de Newton. (Preterpase: por ke ni ne konfuzu la legantojn kaj ridindigu la lingvon estas tre dezirinde, ke ĉiuj esperantaj verkantoj uzu la originajn formojn de propraj nomoj — escepte de tiuj geografiaj, kiuj jam de longe havas specialan esperantan formon.)

Sur kunmetita slipo la prezo de Historio de Yukawa teorio estas indikita 0,60 kr. Mi supozas, ke oni per tio sugestis sv. kr., kaj tiokaze la sumo estas egalvalora al 2 rpk.

S. E.

H. T. Hamblin: Dio, nia centro kaj nia deveno.  
Pensologia Eldonejo, 17 Abbots Road,  
Birmingham 14, Anglujo.  
Prezo 1 ŝilingo.

48paĝa libreto kun mallongaj religiaj meditoj. Tiu ĉi same kiel ĉiuj aliaj religiaj traktaĵoj, kiujn mi legis, havas esence tre bonan lingvon, fluan kaj klarepriman. Ĉu tio dependas de ĝenerala influo de la lingvo en la biblio?

S. E.

Kontraŭkutime mi fine mencias du revuojn senditajn por recenzo. Unu estas La Studento, kies unua numero de la unua kolekto aperis en aprilo. Ĝi havas la subtitolon Internacia studenta gazeto, kaj ĝin eldonas Esperanto-Federacio de Danaj Altlernejoj kaj Studenta Esperanto-Klubo en Kopenhago. Aperas 6-foje jare. Abonprezo 1 us. dol. aŭ egalvaloro, unuopa nro 1,50 d. kr aŭ 3 rpk. Specimena broŝuro senpage. Ricevebla de diversaj landaj perantoj aŭ de Esperanto-Foreningen for Danske Akademikere, Nr. Farimagsgade 9, IV, Kopenhago K., Danujo.

El la programo: "Kio estos pritraktata en nia gazeto? Studentaj kaj universitataj aferoj ĝenerale. Necesas informado pri universitatoj kaj altlernejoj en diversaj landoj; kiel ili instruas, kaj kiaj estas la laboroj de la profesoroj kaj studentoj. La sociala stato de la studentoj, instruistoj kaj sciencistoj meritas nian atenton. Pri Esperantomovado ni ne informos; sed detale ni pritraktos ĉiujn temojn pri la rilatoj inter studentoj kaj esperanto. Atente ni observos la evoluon de la esperantokatedroj. Pri studentaj esperanto-organizo kaj pri la praktika uzado de esperanto inter studentoj ni raportos. Ĝis nun neniu gazeto detale recenzis sciencajn eldonaĵojn aperintajn esperante; tion ni faros. Kaj ni jam ligis al ni kapablajn recenzistojn. Ankaŭ aliajn gravajn eldonaĵojn ni recenzos." —

La unua numero plenumas, kion la programo skizas. Ĝi estas bela kaj bonege redaktita gazeto, kun enhavo valora ankaŭ por homoj, kiuj ne estas studentoj.

La studenta organizo estas grava kiel faka kaj praktika afero, same la gazeto. Kaj pri pli ol tio oni ne parolas en la programo. La signifo de la studenta esperantomovado kaj ĝia gazeto tamen estas pli granda. Same kiel aliaj lingvoj esperanto ne estas celo sed rimedo por spirita aktiveco. Tiu spirita aktiveco, kiu baziĝas sur erudicio kaj orda pensado estas necesa por kultura vivo, en la plena senco de tiu esprimo. Se ni esperantistoj volas kontribui al la kulturo, ĝi estas same necesa por ni.

La alia revuo sendita por recenzo estas Oomoto (nro

130), organo de la Oomotomovado. Iom pli malnovaj esperantistoj certe bone konas tiun revuon el la tempo antaŭ la milito. Al pli novaj, kiuj ne konas ĝin, mi eble povas karakterizi la movadon, kiel formon de universala religio, kiu naskiĝis en Japanujo kaj havas sian centron tie. Japana virino, Nao Deguĉi, 1856—1918, en 1892 komencis la movadon, anoncante la alvenon de Dia regno. Ŝia kunhelpanto kaj Mesio de la movado fariĝis Onisabro Deguĉi, ŝia adoptito (1871—1948). En 1923 oni akceptis esperanton kiel oficialan lingvon de la Oomotomovado por eksterlando.

Tiu ĉi numero estas dediĉita speciale al arto kaj religio. Artikoloj de O. Deguĉi kaj aliaj traktas tiun temon. Multaj belaj bildoj, inter tiuj du tutpaĝaj koloraj, montras pentraĵojn kaj ceramikajojn de O. Deguĉi. Krome troviĝas diversaj informoj pri la movado kaj ĝiaj fondintoj. — Abonprezo 1,5 us. dol. aŭ egalvaloro en rpk. Adr: La centra oficejo de Oomoto, Kameoka, KIOTO, Japanujo.

S. E.

---

## Dankon!

Pro miaj mencioj pri la stato de MR en la numeroj 6/1950 kaj 1/1951 multaj gazetoj aperigis artikolojn kun informoj pri MR kaj instigoj al abono. Multaj homoj per kartoj kaj leteroj esprimis sian simpatian por la revuo. Ĉar mi ne povis mian koran dankon al vi ĉiuj, al la redaktoroj, kiuj afable donis lokon al la artikoloj, kaj al tiuj, kiuj verkis ilin, al la sendintoj de simpatiesprimoj, al tiuj, kiuj altigis la abononombrojn per abonoj al amikoj aŭ donacis monon por abonoj al personoj, kiuj ne povas pagi. — La vendonombro de MR estas nun — 20/7 — 450 ekz. Kiel mi antaŭe menciis, 600 estas bezonataj por kovri la elspezojn eĉ de kvarnumera jarkolekto kun la nuna prezo. Espereble venos tamen iom da mendoj ankaŭ en la lasta duono de la jaro. Dankon kaj korajn salutojn al vi ĉiuj!

Stellan Engholm